

Jongeren Esperanto  
Nieuws

# Jen



Bonvenon en ipernity!

Enskribiĝi senpage | Enrealiti



Luoyang Dragon Navigite de Jamie Brown

## kunhavigu renkontu esploru

facile kaj senpage, ĉu ni eku?

MI aliĝas!



Fotoj, filmoj, sonoj  
viaj kreaĵoj finfine kunaj



familio, amikoj...  
kunhavigu al ili  
aĉi laŭdezo



artisto, aŭtoro?  
montru vin al la  
tuta mondo

esplori

kie furoras | plej novaj | mondmapo | etikedoj



serĉi

elekti unu aŭ plurajn etikedojn

OK

dokumentoj  blogoj  grupoj  membroj

© ipernity 2001-2008

Català | 中文 | Deutsch | English | Español | Esperanto | Français | Italiano | Nederlands | Pl ...

**ipernity**

vertaald naar het Chinees via Esperanto

**PSKK**

raporto de la FLEJA-renkontiĝo

**Esperantolaan in Tienen**

officiële inhuldiging

**Meertaligheid in Europa**

EU-commissaris Orban over Esperanto

Periodiek tijdschrift, jaargang 33, nummer 172 voorjaar 2008  
Perioda revuo, jarkolekto 33, numero 172, printempo 2008

**ISSN 1380-9881**

# Colofon / kolofono

**Jongeren Esperanto Nieuws** (JEN) is een informatieblad voor Nederlands-sprekende jongeren die belangstelling hebben voor de internationale taal Esperanto en voor taalproblemen in de wereld. Het is een gezamenlijke uitgave van de Nederlandse (NEJ) en Vlaamse (FLEJA) Esperantjongeren.

Het drukken en verzenden van de JEN wordt verzorgd door het *Esperanto-Centrum* te Antwerpen; de braille-versie wordt verzorgd door de Chr. Bibliotheek voor blinden en slechtzienden in Ermelo.

NEJ en FLEJA zijn de Nederlandse, resp. Vlaamse afdelingen van *TEJO*, *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*.

Een individueel lidmaatschap kost 20 EUR (tot 30 jaar). Giro 2717591 t.n.v. ĉefdelegito de UEA in Rotterdam of giro 402-5510531-55 t.n.v. Flandra Esperanto-Ligo in Antwerpen met vermelding van *Individua membro MJ-T*.

TEJO-leden ontvangen een jaarboek, de bladen TEJO-tutmonde en Kontakto, plus kortingen bij bijeenkomsten.

Naast bijdragen van medewerkers, zijn de artikels in deze JEN onder andere gebaseerd op berichten uit e-maillijsten (nejkajfleja, Retinfo, ...) en webstekken ([www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org), [www.raporto.info](http://www.raporto.info),...).

**De uiterste datum voor het binnensturen van artikels voor JEN 173 is 8 juni 2008**

## Vlaanderen (Int. toegangscodes +32)

### Redactie/Redakcio:

Yves Nevelsteen, Koning Albertlaan 147, 9000 Gent. Tel. 09/3307156  
[yves.nevelsteen@gmail.com](mailto:yves.nevelsteen@gmail.com)

*Administratie en informatie / Administrado kaj informado:* FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.

### Abonnementen en lidmaatschap

- Introductieabonnement (drie nummers) gratis
- Lidmaatschap FLEJA/FEL: 25 EUR (Omvat de tijdschriften Horizontaal en JEN)
- Abonnement op JEN: 9 EUR
- Steunende leden die 30 EUR of meer bijdragen, ontvangen ook JEN.

### Argenta-rekening / Ĝirkonto:

979-6339610-83 t.a.v. de Vlaamse Esperanto Jongeren, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.

### FLEJA-bestuur / FLEJA-estraro:

- Heidi Goes (voorzitter/prezidantino)  
[heidi.goes@gmail.com](mailto:heidi.goes@gmail.com)
- Yves Nevelsteen (vicevoorzitter/vicprezidanto)  
[yves.nevelsteen@gmail.com](mailto:yves.nevelsteen@gmail.com)
- Yannick Vercammen (secretaris/sekretario)  
[yannickvercammen@telenet.be](mailto:yannickvercammen@telenet.be)
- Matthias Humet (penningmeester/kasisto)  
[matthias.humet@gmail.com](mailto:matthias.humet@gmail.com)
- Björn Claes (bestuurslid/estrarano)  
[bjornclaes@belgacom.net](mailto:bjornclaes@belgacom.net)
- Carsten Mischke (bestuurslid/estrarano)  
[batalanto@yahoo.de](mailto:batalanto@yahoo.de)

### E-post en www / retpoŝto kaj ttt:

e-post: [fleja@telenet.be](mailto:fleja@telenet.be)  
internet: <http://www.esperanto.be/jongeren>  
<http://www.esperanto.be/junuloj>

## Nederland (Int. toegangscodes +31)

*Administratie en informatie / Administrado kaj informado:* Fabien van Mook, Sophoclesstraat 121, 3076 AL Rotterdam, Tel.: 010/2917151  
[fabien@galerio.org](http://fabien@galerio.org)

### Abonnementen en lidmaatschap

- Introductieabonnement Jen (1/2 jaar): gratis  
Enkonduka abono Jen (duona jaro): senpage
- Lidmaatschap NEJ per jaar (incl. Jen):  
Tot 20 jaar: 11,50 EUR / Vanaf 20 jaar: 14,50 EUR
- Abonnement op JEN: 9 EUR
- Donateurs die 14,50 EUR of meer bijdragen, ontvangen ook JEN.

### Girorekening / Ĝirkonto:

719930 t.n.v. Nederlanda Esperanto-Junularo, Amsterdam.

### NEJ-bestuur / Estraro de NEJ:

Op dit ogenblik is er geen actief bestuur in Nederland. Meer informatie vindt u in deze JEN op pagina 20.

En tiu ĉi momento ne ekzistas aktiva estraro en Nederlando. Pli da informoj vi trovas en tiu ĉi JEN en paĝo 20.

### E-post en www / retpoŝto kaj ttt:

e-post: [info@esperanto-jongeren.nl](mailto:info@esperanto-jongeren.nl)  
internet: <http://www.esperanto-jongeren.nl>  
mobiel/poŝtelefono: Tel.: 06-42507502

Provglegis Heidi Goes.

Saluton!

In deze JEN zijn opnieuw heel wat pagina's gewijd aan activiteiten van de internationale vereniging E@I. De laatste tijd heeft E@I een aantal opmerkelijke successen geboekt. 400.000 cd's over Esperanto als gratis bijlage bij de tweede krant van Polen; dat is bv. "niet slecht".

De combinatie internet-Esperanto is heel beloftevol. Als de krachten over de grenzen heen gebundeld worden, dan krijg je knappe resultaten: de vertaling van ipernity naar het Esperanto en het Chinees, meer dan 500 reacties op het forum van de EU-commissaris voor meertaligheid...

Het bestuur van FLEJA heeft beslist om in 2008 een bescheiden som vrij te maken om de redactie te ondersteunen in haar plan opnieuw vier keer per jaar een JEN van minstens 20 pagina's uit te geven. De JEN-redactie zoekt nog steeds versterking. Mocht je interesse hebben om mee te werken, neem dan vrijblijvend contact op met de huidige redacteur ([yves.nevelsteen@gmail.com](mailto:yves.nevelsteen@gmail.com)).

*Yves*

P.S.: je leest het goed: in 2008 zal JEN terug viermaal verschijnen!

### **Inhoud      Enhavo**

Voorwoord	3
PSKK-raporto	4-5
Ipernity vertaald via Esperanto	6
Diversaj informoj	7
400.000 poloj ricevos e-kurson	8
5 jaar Lernu!	9
Inhuldiging Esperantloaan	10
Ĉeĥio invitas vin	11
Kampanjo por pli-angligi la mondon	12
Taal en cultuur	13
Provizora malliberigo en Belgio	14-15
Meertaligheid in Europa	16-19
Eksterordinara membrokunveno	20
Primitiva Renkontiĝo	21
Aktuale.info	22-23
Activiteitenkalender	24

## PSKK-raporto

---

PSKK estas la aŭtuna renkontiĝo de la flandra Esperanto-junularo. Dum la PostSomera KlačKunveno oni interalie postĝuas la somerajn aranĝojn kaj antaŭĝojas pri la vintraj kunvenoj. Estas interŝanĝo de fotoj, oni rakontas, prelegas, ktp. Tradiciaj programeroj dum la ĉiujara renkontiĝo estas la danckurso de Bart DEMEYERE kaj Heidi GOES kaj la gvidata vizito al la urbo aŭ komunumo kie okazas PSKK.

Kio en la jaro 1996 komenciĝis kiel komuna aranĝo de la nederlanda kaj flandra Esperanto-junularaj asocioj kun 20-o da partoprenantoj, en 2007 kreskis ĝis profesie organizita familia aranĝo: PSKK. La pasinta PSKK okazis en Halen, Limburgo de la 31/10 ĝis 04/11/2007. Ĉi-jare estis escepte longa PSKK je escepta malalta kotizo kaj kun denove kreskinta nombro de partoprenantoj: ĝin ĉeestis preskaŭ 80 homoj el pli ol 5 landoj. Necesis organizi taksiservon, ĉar la ejo estis malfacile atingebla per publika transporto.

La hungara lingvistino Katalin KOVÁTS gvidis aktivigan kaj paroligan porprogresantan kurson. La partoprenantoj multe ridis sed ankaŭ lernis pri gramatiko kaj pliriĉiĝis sian vortotrezoron. Ĵaŭde vespere sino Kováts prelegis pri utilaj, konsilindaj lerniloj, kaj pri sia

retejo [www.edukado.net](http://www.edukado.net). La aŭskultantaro povis ekkoni la celajn kaj funkciojn de la paĝaro, kaj ties valoron por instruistoj kaj lernantoj. Videblis specimenoj de la sekcioj, kaj Katalin rakontis pri la laboro kiun ŝi jam dum pli ol kvin jaroj faris malantaŭ la kulisoj.

Christoph FRANK, germana profesia pupludanto, gvidis dum PSKK infanteatron. La titolo de la teatraĵo estis "La eta sorĉistino", kaj la infanoj povis ne nur aktoriĝi, sed ankaŭ prepari la figurojn. S-ro Frank prezentis ankaŭ magiaĵojn. Ambaŭ prezentojn la partoprenantoj tre ĝuis.

Per luita buso la partoprenantoj povis ekskursi tuttage al Hasselt, ĉefurbo de la provinco Limburgo. Matene ni vizitis la nacian juniperbrandan muzeon, dividitaj en du grupoj. La gvidistoj rakontis pri la historio kaj maniero produkti juniperbrandon. La parolado de unu gvidisto estis tradukita al Esperanto por la nederlandlingvanoj. Poste la plenkreskuloj ricevis glason da juniperbrando por gustumi.

Posttagmeze ĉiuj povis propriniciate viziti la urbon. Aldone en la riĉa programo estis ankaŭ libroservo de la Flandra Esperanto-Ligo, manlaboro kaj sporto por infanoj, ornamado de la ejo por Haloveno, festado kaj

dancado, tabloludoj,  
filmomontrado, danckurso,...

Vizitis la aranĝon reprezentantoj de la pola klubo Varsovia Vento, kun kiu ni kunlaboras kaj interŝanĝas spertojn. Ideo estas iom post iom krei internacian teamon de organizantoj de renkontiĝoj, por labori sinergie, lerni unu de la alia kaj helpi pri praktikaĵoj.

Venontjare PSKK okazos en Zutendaal, kie ni havis bonajn spertojn en 2005. Pro bonega etoso, ni denove elektis la

Haloveno-semajnfinojn. Eble ankaŭ vi interesiĝas partopreni la aranĝon? Post kelkaj jaroj dum kiu Haloveno estis la temo de la aranĝo, venontjare la temo estos Saveno, la tago de la novjaro kaj samtempe sankta tago de mortintoj en kelta tradicio. Ĝi estas la antaŭulo de la moderna Haloveno.

Fotojn de PSKK vi trovos interalie en jena retejo: <http://www.ipernity.com/doc/yves/home/photos>

*Heidi kaj Yves*



## Ipernity vertaald naar het Chinees via Esperanto

In oktober 2007 werd de Esperanto-versie van ipernity gelanceerd. Deze nieuwe website, die het mogelijk maakt om foto's, muziek en teksten uit te wisselen en er commentaar op te geven, wordt ondertussen actief gebruikt door meer dan 650 esperantisten van over de hele wereld.

In november 2007 werd gestart met de vertaling naar het Chinees van de website. De Chinese esperantist Zhang Xuesong nam hiertoe het initiatief. Hij stelde voor om het Esperanto te gebruiken als tussentaal, omdat vele van zijn vrienden het Engels

of een andere vreemde taal niet machtig waren.

Paul Peeraerts, die de vertaling naar het Esperanto coördineerde, stelde het idee voor aan de verantwoordelijke van ipernity, Christian Conti. Mijnheer Conti reageerde heel enthousiast op de nieuwe mogelijkheden die de Esperanto-versie van ipernity biedt. Hij is zelfs zo enthousiast, dat hij de taal nu zelf aan het leren is.

[www.ipernity.com](http://www.ipernity.com)

# 共享 相聚 探索

方便又免费，还等什么？

我要注册！



相片、视频、音频  
你的作品终于能  
放在一起了



家人、朋友...  
想与谁分享  
就与谁分享



艺术家、作者？  
向世界展示自己

**Germana televido raportas pri Esperanto** Daniel HADDAD kaj kantoj el japana kasedo *Antaŭ du jaroj*.

ARD (Kanalo 1), tutlanda germana tv-kanalo prezentis pozitive Esperanton, ĝian skizan historion kaj nuntempan vivantan karekteron en nova televidprogramo la 17-an de februaro en 2008.

La ĉ. 5-minuta filmeto (kun scenetoj de E-kurso far Zsófia Kóródy en München) estas videbla ĉe <http://www.esperanto-muenchen.de/e-brain/e-brain.wmv> (Uzanto-nomo estas "e-brain" kaj la pasvorto estas "roterdamo").

Post kelkaj tagoj la dosiero estos forprenata de tie sed la registrita dvd-filmo estas daŭre havebla en bona kvalito de la Interkultura Centro Herzberg.

*fonto: Ret-info:  
<http://www.eventoj.hu>*

--

### **Kantarvizio renovigita**

Tempo pasas kaj reta esperanta kantaro-vikio daŭre kreskas. Ĝi ekzistas dank' al kunlaboro de multaj esperantistoj el diversaj mondopartoj.

Estas fiere por ni diri, ke kvanto de kantotekstoj en la kantaro fine de 2007 superis 800! Inter lastaj aldonaĵoj estas plena albumo de Supernova, Inspiro,

La kantaro kreskas ne nur nombre, sed ankaŭ teknologie. Post transiro al pli moderna vikiujo DokuWiki ĝi havigis novajn trajtojn, ekz. etiketoj, pere de kiuj nun eblas aŭtomate kategoriigi paĝojn. Viki-uzantoj nun havas personajn paĝojn en la kantaro. La vikiujo iĝis pli sekura kaj belaspekta.

Plej lasta kaj revolucia novaĵo estas integreblaj filmetoj de YouTube kaj Overstream. Nun vi ne nur povas trovi tekston de ŝatata kanto, sed eble tuj vidi ĝian plenumadon, sekvi muzikon, rigardante tekston kaj kun-kanti :-). Vero estas, ke da tiuj filmetoj nun ne estas multe, sed ekzistas alternativa varianto - krei subtitolojn al tradukitaj kantofilmoj pere de Overstream. Rezultiĝas kvazaŭ reta karaokeo.

La kantaro ĉiam bonvenigas kantemulojn kaj muzikŝatantojn. Venu al la kantaro, trovu viajn plej ŝatatajn tekstojn. Eble vi deziros ion korekti, aldoni aŭ proponi. Uzu nian gastlibron por skribi viajn opiniojn kaj dezirojn libere.

Vizitu **[www.ikso.net/kantaro](http://www.ikso.net/kantaro)**

*Fonto: [http://www.ikso.net/kantaro/novajxletero\\_2](http://www.ikso.net/kantaro/novajxletero_2)*

## **400.000 poloj ricevos Esperanto-kurson!**

---

En septembro 2008 ĉiuj legantoj de la prestiĝa pola tutlanda ĵurnalo Gazeta Wyborcza ricevos kun la gazeto ankaŭ kompaktdiskon kun kurso de Esperanto kaj ampleksa prezento de la Esperanto-movado. La diskon laŭmendo de la urbo Bjalistoko produktos la teamo de **E@I** (ikso.net), kaj la eldonon financos la urbo mem. La eldono de la disko estas parto de granda informa kampanjo pri Esperanto, iniciatita de la urbo Bjalistoko lige kun la Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en la naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof en 2009. 400.000 poloj ricevos Esperanto-kurson.

Tadeusz Truskolaski, la urbestro de Bjalistoko, multe aktivis por ke la Universala Kongreso de Esperanto, por marki la 150-an jubileon de Ludoviko Zamenhof, okazu ĝuste en ties naskiĝurbo. Fine de julio 2007 okazis en Bjalistoko kampanjo por kolekti subskribojn favore al la kongreso, kaj la alvokon subskribis oficiale la urbestraro. Poste Tadeusz Truskolaski persone veturis al la Universala Kongreso de Esperanto en Japanio por transdoni la alvokon kaj inviti la kongreson al Bjalistoko.

En Jokohamo la 9-an de aŭgusto la estraro de UEA decidis, ke la jubilea kongreso okazu en Bjalistoko. La urbestro de Bjalistoko mem ĉeestis la

kunsidon, kaj krom entuziasman akcepton de la urbanoj, li promesis vastan apogon de la urbo al la organizado de la kongreso.

Parto de tiu apogo estas la nuna ampleksa informa kampanjo pri Bjalistoko kiel "Urbo de Esperanto". La kampanjo komenciĝis jam decembre 2007, kiam lige kun la 8-aj Bjalistokaj Esperanto-tagoj Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof, nepo de Ludoviko Lazaro, estis deklarita honora civitano de la urbo.

La inform-kampanjo laŭplane vastiĝos post duonjaro, rakontas Elżbieta Karczewska, la prezidanto de Bjalistoka Esperanto-Societo.

La plej intensa kampanjo estas planata julie 2008 kun diversaj surstrataj aranĝoj: eventoj, renkontiĝoj, afiŝoj kaj afiŝegoj, tendo de toleremo sur la urba placo kaj tiel plu. La pinto de la kampanjo okazos septembre, kiam oni aldonos la KD-n al la landa eldono de Gazeta Wyborcza. La urbo Bjalistoko pagos la inform-kampanjon kaj la eldonon de la KD el sia buĝeto.

La komputila disko en luda formo instruos Esperanton kaj prezentos la Esperanto-movadon al la pola publiko.

*Fonto: Libera Folio*



Lernu!: een gratis webstek om kennis te maken met de internationale taal Esperanto en deze te leren spreken. Het is in zekere zin ook een experiment met de methodiek van het leren van een taal via het internet, zonder leraar en zonder klas.

### Achtergrond

Het idee achter Lernu! als een leer-omgeving ontstond in het kader van het eerste Esperanto @Internet (E@I)-seminar(ie) in Zweden in april 2000, en werd verder uitgewerkt tijdens een tweede seminar(ie) in oktober 2001, eveneens in Zweden. In juli 2002 werd financiële steun voor het project gevonden bij het ESF-fonds, en in augustus werd een begin gemaakt met het opzetten

van de webstek. Vier maanden later, in december 2002, ging de webstek online.

21 december 2007 is de vijfde verjaardag van de lancering van Lernu!, de grootste en meest gebruikte website om Esperanto te leren.

Om daar bij stil te staan, heeft het Lernu!-team interessante informatie over het project verzameld, samen met plaatjes, foto's en interviews met de mensen die de webstek draaiend houden en met gebruikers.

Meer informatie vind je op [http://nl.lernu.net/pri\\_lernu/informiloj/artikolo.php](http://nl.lernu.net/pri_lernu/informiloj/artikolo.php)



Het Lernu!-team

## Inhuldiging Esperantiolaan in Tienen

Op 20 oktober werd het 15-jarig bestaan gevierd van de Esperantoclub van Tienen. Een belangrijk onderdeel van feestprogramma was de inhuldiging van de Esperantolaan in Tienen. Uw JEN-redacteur was erbij :-)

Langs de Mene in Tienen bevonden zich vette weiden, die de Boterpot werd genoemd. Toen er een nieuwe wijk ontstond, stelde de verantwoordelijke van de stad, mijnheer Kempeneers, voor de naam in eer te herstellen. De Gemeenteraad ging op 21 mei 1996 akkoord met de benaming Boterpotweg.

Kandidaat-kopers van percelen, gelegen aan de Boterpotweg, reageerden echter teughoudend, omdat de benaming geen internationale weerklank heeft. Deze kopers vreesden dat het hun bedrijf geen goed zou doen als op hun facturen een agrarische naam zou prijken.

Daarom stelde mijnheer Kempeneers aan het schepencollege voor om Esperantolaan als nieuwe naam te lanceren. Op 19 februari 1998 ging de gemeenteraad akkoord om de goedgekeurde Boterpotweg te wijzigen in Esperantolaan. Internationaler kan het niet. Intussen ging ook de Provinciale Commissie voor Plaatsnaamgeving met deze wijziging

10 akkoord!

Dat de Esperantoclub van Tienen pas eind 2007 "hun" Esperantolaan inhuldigden, heeft alles te maken met het feit, dat zij er bij het begin als een braakliggend terrein uitzag, zonder enig ander spoor van menselijke activiteit. Ondertussen is het een belangrijk industrieel terrein in volle uitbouw. Handel, industrie en Esperanto hebben een gemeenschappelijk doel: alle drie bouwen ze aan de toekomst.



Bert Boon, de voorzitter van de Tiense Esperanto-club

Yves

E-klubo „La Ponto“ invitas vin al sia centjariĝo al Sudbohemia fabela reĝlando al la III-a Sabla Printempo inter la 4-a kaj 6-a de aprilo 2008 en Písek (100km sude de la ĉefurbo Prago).

Písek estas agrabla kultura urbeto kun la dua plej malnova ponto en la tuta Mezeŭropo kaj bela natura ĉirkaŭaĵo, bone trafike atingebla el ĉiuj direktoj. Ĉi-jare oni interalie preparas por vi:

- \* Praktika prezentado „Esperanto en Interreto“
- \* Bunta kultura matineo en la burga arealo kaj vizito de la Muzeo de la regiono Prácheň
- \* Kultura vespero (kun muzika kaj danca programo) kiuj okazos en bela medio de la ĵus komplete rekonstruita konstruaĵo de iama „Sladovna“ (Maltejo) en la burga arealo.

Sabate posttagmeze kaj dimanĉe antaŭtagmeze okazos paralele tri-horaj programoj en tri grupoj:

1. Trejnseminario pri Vikipedio (por komencantoj)
2. Paroliga lingvoseminario
3. Turisma programo

Loĝado estas certigita en turisma hotelo BULY en 2-litaj ĉambroj kun propra duŝo/necesejo (loĝado en 1-lita ĉambro kontraŭ krompago eblas). La hotelo situas vid-al-vide al la Urba Insulo, ĉ. 5 minutojn da agrabla surborda promenado ĝis la Ŝtona Ponto kaj

la urbocentro.



Dank' al supozata subvencio de la urbo Písek, la partoprenkotizo estos nur 50 eŭroj. Ĝi inkluzivas:

- \* 2 tranoktojn en 2-lita ĉambro en hotelo BULY
- \* kompletan programon (klerigan, kulturalan kaj turisman, inkluzive enirpagojn)
- \* studajn kaj turismajn materialojn kaj KDojn
- \* 2 manĝojn (sabatajn tag-manĝon kaj vespermanĝon en la restoracio)

Aliaj manĝoj estas libervolaj kaj memzorgaj (matenmanĝi eblas en la hotela restoracio).

Ĉeforganizantoj de la aranĝo geedzoj DVOŘÁK, estas spertaj esperantistoj kaj organizintoj de multaj aranĝoj.

Pliajn informojn kaj aliĝilon petu de via JEN-redaktoro.

Yves

## Kampanjo por pli-angligi la mondon

Estas sufiĉe konate ke ekde la jaroj 1960 Britio kaj Usono akorde kaj unuigitaj krom la "Commonwealth" decidis pli firme kaj organize disvastigi kaj devigi la anglan kiel internacian lingvon por la tuta mondo.

Tiel la eksa brita imperio renaskiĝus kune kun usona imperio ĉar la lingvo ĉiam devis akompani imperion. Tiam celon prenis la "British Council" kiel ĉefa publika organizo.

Fakte, okazis ke en la tuta mondo, ĉiuj registaroj devigis studi la anglan en la publikaj lernejoj kaj eĉ pagi milionojn por instruistoj kaj por aĉetado de manlibroj ktp rekte kaj nur eldonitaj en Usono aŭ Britio.

Estis sendube la pli sukcesa "cerblavado" en la homa historio kaj la plej granda kultura negocado.

Ĉar sendube "financoj" kaj "ekonomio" estis la "kerno" de tia ĉi kultura monda angliĝo, kaj trafa minaco kontraŭ multlingveco kaj multkulturo. Tamen tio ne sufiĉis por ke la angla tute venku.

Eĉ se ĝia internacieco ne povas esti neata, eble la alveno de interreto, finfine agadas kontraŭ plia disvastigo de la angla.

Laŭ socilingvistoj, la angla jam alvenis al pinto de sia disvastigo,

kaj ekde nun ĝia internacieco malpliĝos. Eble la "British Council" konsciis pri tio, kaj decidis lanĉi novan tutmondan kampanjon.

Fakte, laŭ informo de la BBC: "Ĉefministro Gordon Brown anoncis novan projekton por disvastigi la instruadon de la angla".

Tio okazos dank' al Interreto, en nova tute libera senpaga programaro "Lernu la anglan de vi mem", kun instruistoj, trejnitaj el Barato, IP-telefonon, ktp ĉefe unue kun la celo angligi Ĉinion.

"Ni malfermos la anglan al novaj landojn kaj novaj generacioj... por ke la angla estu la elektata lingvo internacia por la tuta mondo"- deklaris Gordon Brown.

Do, ĉar Esperanto estas ĝis nun la nura konkurenca al la angla, la Esperanto-movado devas tuj reagi. Oni devus fari la samon kaj lanĉi novan tutmondan kampanjon por intensigi ĉeeston de Esperanto kaj ĝian multoblighon uzon en la reto: ĉar kiel iam deklaris nia majstro: "por ke lingvo estu internacia, ne sufiĉas nomi ĝin tia...".

*Fonto: raporto.info*

We leven allemaal in een multiculturele samenleving, maar hoeveel weten we eigenlijk af van de andere culturen die zich rondom ons bevinden? Vaak kennen we wel enkele clichés, maar in hoeverre komen die overeen met de waarheid?

Met de voordrachtenreeks *Taal en cultuur* tracht de Vlaamse Esperantobond hierin verbetering te brengen. Elke maand worden in het Esperantohuis in Antwerpen een andere taal en cultuur van een land voorgesteld.

De Vlaamse Esperantobond werkt hiervoor samen met andere verenigingen en krijgt voor het project subsidies van de Vlaamse overheid en de provincie Antwerpen.

Het project Taal en cultuur is een geslaagde poging van de Vlaamse Esperantobond om naar buiten te treden.

Op vrijdag 7 maart wordt Baskische cultuur voorgesteld en op 21 maart de Baskische taal. Je bent van harte welkom!



Alex Humet stelde de Catalaanse taal en cultuur voor.

## Provizora malliberigo en Belgio

---


La fama esperantisto Petro De Smedt, interalie aŭtoro de vortaro Esperanto-nederlanda, en decembro 2007 estis arestita kaj provizore enkarcerigita, ĉar mense malsana knabino kulpigis lin. Petro publikigis multajn leterojn pri siaj spertoj en la malliberejo sur ipernity. En ili li rakontas kiel oni traktis lin kaj kiom grava estis la subteno de la Esperanto-komunumo dum tiu periodo.

Hazarde dum Petro estis en malliberejo, la Ordeno de la Flandra advokataro lanĉis kampanjon por atentigi pri la misuzoj en Belgio de la rajto

provizore malliberigi homojn. Kvankam JEN estas porjunulara revuo, mi pensis ke escepte serioza teksto pri tiu ĉi temo en ĝi aperu.

La asocio Orde van Vlaamse Balies (Ordeno de la Flandra Advokataro, OVB) startigas kampanjon kontraŭ tio, kion ili nomas "la sisteman misuzon de la leĝo pri provizora malliberigo".

Laŭ la OVB "forpreno de libereco ŝajnas ekesti aŭtomatismo." Triono de la belgaj malliberuloj konsistas el homoj, kiuj ne estas kondamnitaj kaj do estas supozataj esti senkulpaj ĝis dum



## Provizora malliberigo en Belgio

proceso oni pruvis la malon. Aŭ ĝis kiam oni liberigas ilin, ĉar laŭ la advokataro ĉiam pli da homoj post monatoj en malliberejo estas poste malpersekutitaj aŭ liberigitaj.

"Ĉiujare pli kaj pli da homoj estas arestitaj", diras Jo Stevens, prezidanto de la OVB. "Forpreno de libereco, radikala agado, ŝajnas ekesti aŭtomatismo. Arestado estas ĝustigita surbaze de stereotipaj formuloj, kiujn komputilo eligas. La prokuroraroj indikas kion ajn ili volas: danĝero pro recidivo, danĝero ke homo fuĝus,... Ĉiam temas pri la sama klasika vortumado.

La OVB komence de januaro distribuis, interalie en la ĵurnalo *De Morgen*, grandskale pansakojn kun sur ĝi listigo de la 10 rajtoj de arestinto. Laŭ Stevens estas absoluta nepraĵo. "Nia mesaĝo estas: iu ajn povas hodiaŭ esti la viktimo de arbitra, nelaŭleĝa arestado. Do, metu la sakon hejme, tiam vi ne devas uzi libron aŭ jakon por kaŝi vian kapon dum la forkondukado. Atentu, vi neniam scias ĉu ĝi ankoraŭ utilos."

Ne ekzistas ciferoj pri la ekzakta nombro de belgoj, kiuj ĉijare senkulpaj ek troviĝas en malliberejo. Tamen inter 2003 kaj 2007 entute 579 eks-arestitoj estis finfine juĝataj senkulpaj. Laŭ la OVB temas nur pri la pinto

de la glacimonto. Pri kulpigitoj kontraŭ kiuj la presekutado estas nuligita duonvoje de la esplorado ne ekzistas ciferoj, nek pri la kazoj kiujn prokuroraroj ne persekutas.

La misuzo de la provizora malliberigo laŭ pun-pledisto John Maes (OVB) ja havas perversan kromefikon: "Homoj estas tamen kondamnitaj, por ke ili ne rajtu apelacii al la leĝo pri la Senefika Provizora Malliberigo (kiu donas al civitanoj en kelkaj kazoj la rajton je kompensaĵo). Do: ni akuzu ilin je enkarcerigo por tri monatoj, ĉar tiujn tri monatojn li tamen jam estis en malliberejo. Cetere ni decidu nur pri subkondiĉa liberiĝo, ĉar tio ja ne tro devus ĝeni al la persono."

Jen stereotipa ideo kiu tra la jaroj kreskis ĉe multaj juĝistoj. Kaj jen, vi estas punata por periodo kiu mirakle kongruas ekzakte kun la daŭro de via provizora mallibereco.

Pri la spertoj de Petro en la malliberejo vi povas legi en lia ipernity-blogo:

[http://www.ipernity.com/blog/petro\\_desmet](http://www.ipernity.com/blog/petro_desmet)

Aperas ankaŭ artikolo en la revuo **Monato** pri liaj spertoj.

Feliĉe Petro intertempe estas denove libera homo. Sed provizore!

## Meertaligheid in Europa

---

De EU-commissaris voor meertaligheid, Leonard Orban, onderhoudt een forum op het internet. In dit forum sprak hij onlangs voor het eerst over Esperanto. Mijnheer Orban schrijft waarom hij geen voorstander is van het Esperanto als oplossing voor de taalproblemen in Europa. Esperantisten van over de hele wereld reageerden massaal; al meer dan 500 keer. **Leo De Cooman** reageerde als volgt in het Nederlands:

Geachte Heer Orban,

Ik stel verheugd vast dat u - in tegenstelling met anderen - het bestaan van het Esperanto niet negeert. Ik ben blij dat u de ogen niet sluit voor de feiten. Bedankt voor uw uitnodiging verder van gedachten te wisselen... ook als u onze argumenten niet onmiddellijk kan aanvaarden. Ik ga hier graag in op uw uitnodiging.

U vermeldde drie argumenten om het Esperanto niet op te nemen als gemeenschappelijke EU-taal. Sta me toe ze te weerleggen. Naar uw eigen woorden verwachtte u immers al reacties van esperantisten.

Het eerste argument is zuiver formeel: Er staan in de huidige wetgeving drie voorwaarden om

een taal als officieel te kunnen aannemen. Ik veronderstel dat democratie en rechtvaardigheid een hogere waarde hebben dan een ooit politiek aangenomen overeenkomst.

De omstandigheden veranderen. Nieuwe omstandigheden vereisen nieuwe wetten. In de periode toen er auto's op de baan begonnen te komen, was het nodig de wetgeving voor het verkeer aan te passen om drama's te voorkomen. Als er een EU-wetgeving bestaat, die niet meer deugt in de huidige omstandigheden is het de verantwoordelijkheid van de EU-leiders de wetten aan te passen of te laten aanpassen, zoals ze dat ook al doen voor andere problemen.

Is het nodig de veranderingen in de taalsituatie binnen de EU te vermelden en commentaar te geven over de verdere evolutie? Zal de EU zich kunnen ontplooiën als een democratische unie, als het aantal officiële talen tot verschillende tientallen zal uitgegroeid zijn? En is het democratisch dat talen, die in hun vaderland - om een of andere politieke reden - er niet in slagen erkend te worden, ook in de EU niet erkend worden? Wij allen en in het bijzonder de leiders van de EU moeten er ons terdege van bewust zijn dat



dergelijke toestanden bijzonder gevaarlijk zijn en broedplaatsen voor terrorisme kunnen doen ontstaan.

Wel, ik ben absoluut niet tegen veeltaligheid, ik stel gewoon de problemen van veeltaligheid vast. Als Belg zie ik elke dag de problemen van tweetaligheid. Ik erken graag het nut van het kennen van verschillende talen, ik heb zelf acht talen geleerd, waaronder Esperanto. Ik ken dus duidelijk de mogelijkheden van deze laatste. En als ingenieur heb ik geleerd realistisch te blijven, de onmogelijkheid te zien veel talen te leren, de kosten, de nu bestaande onrechtvaardigheden, de essentiële instabiliteit van veeltaligheid en het middel om die te stabiliseren, de kans op uitsterven voor "kleine talen", gevaar waarop ook UNESCO de aandacht trekt.

Hoewel uzelf naar uw eigen woorden niet erg gelooft in een lingua franca, stellen we vast dat de huidige EU in werkelijkheid de richting inslaat van de internationale toepassing van één enkele, zich spontaan verbreidende, nationale taal. Spontaan? Ik betwijfel dat... en de uitspraak van mijnheer Gordon Brown enkele weken geleden versterkt mijn twijfel. Op deze manier zullen de burgers, die deze bevoorrechte taal als

hun moedertaal spreken, eersterangs Europese burgers worden. Maar alle andere burgers (90% van de bevolking van de EU) zullen tegelijk allemaal tweedeklasse taalgebruikers worden, tweede-rangsburgers. De gemeen-schappelijk toe te passen, rechtvaardige taal, die niemand onrecht aandoet, kan alleen een neutrale taal zijn, bv. het Latijn en Esperanto. Gepland volgens het principe van Comenius ("Omnino igitur viris doctis cogitandum erit de modo, quo aut sibi notitiam quarumvis linguarum... facile comparent: aut unam aliquam linguam constituent, qua et ipsi inter se communitur utantur, et gentes omnes ...eandem perdocere facile queant..."), is Esperanto een grootteorde gemakkelijker te leren dan het Latijn, of dan andere, nationale, talen. Comenius had de moeilijkheid van het Latijn en van de nationale talen al duidelijk vastgesteld. Verschillende pedagogische experimenten hebben bewezen dat door eerst Esperanto te leren, het leren van andere talen en vakken vergemakkelijkt wordt. Met behulp van Esperanto maken de leerlingen zich een methodiek van taalleren en logica eigen. Het tweede door u vermelde argument is sterk overdreven in het bijzondere geval van

## Meertaligheid in Europa

---

Esperanto; hetzelfde argument was overigens ook geldig voor alle wel aanvaarde officiële talen. Het was ongetwijfeld ook nodig de terminologie verder te ontwikkelen bijvoorbeeld voor het Roemeens, het Bulgaars, het Iers, het Maltees, enz, nietwaar? Dat heeft niet belet ze te officialiseren. Terecht! Welnu, zoals u weet is Esperanto een plantaal: het vormen van neologismen werd van meet af aan voorzien en gepland in regel 15 (van de 16 grammaticale regels) van het Fundament van de taal. Door deze regel en door zijn algemene structuur is Esperanto veel geschikter om nieuwe termen te vormen dan eender welke nationale taal. Nationale talen zijn helemaal niet ontworpen voor internationale communicatie.

Gelieve u te informeren over de terminologieproblemen van de Chinese en Arabische delegaties bij de UNO in vergelijking met de mogelijkheden van het Esperanto; daarover heeft Claude Piron als rechtstreekse getuige - hij heeft bij de UNO gewerkt - iets geschreven. Het is te lezen in afdeling m van:

<http://claudepiron.free.fr/articlesenneerlandais/taalkundige.htm> (Nederlandstalige versie)  
<http://claudepiron.free.fr/articlesenfrancais/etudesurterrain.htm> (originele Franstalige versie)  
<http://claudepiron.free.fr/>

[articlesenanglais/communication.htm](http://www.egalite.freeweb.hu/articlesenanglais/communication.htm) (Engelstalige versie)

Om te bewijzen dat Esperanto al een volledig ontwikkelde taal is, heeft een internationale werkgroep met 17 leden in 2004 de Esperantoversie geschreven van de eerste twee hoofdstukken van het Grondwettelijk Verdrag van de EU. Ik nodig u uit de Roemeens-Esperanto versie te bekijken ( <http://egalite.freeweb.hu/konstitucio/konstro/indekso.htm> ) en de Engels-Esperanto versie ( <http://egalite.freeweb.hu/konstitucio/konsten/indekso.htm> ) op de webstek <http://www.egalite.fw.hu> .

Aan het einde van de Engels-Esperanto, Frans-Esperanto en Duits-Esperanto versies zal u details vinden over het ontstaan en de grammatica van het Esperanto. Ik vestig er uw aandacht op, dat een geschoolde Europeaan - omwille van de internationale woordenschat van



*Leonard Orban*

het Esperanto - hele zinnen kan verstaan uit de Esperantotekst, zelfs zonder het vooraf geleerd te hebben.

In uw derde argument beweert u dat *linguae francae* niet het resultaat zijn van een wetgevende of politieke beslissing. Sta me toe uw bewering in twijfel te trekken. Ik ben ingenieur, geen historicus, ik meen nochtans te weten dat er bijvoorbeeld verplicht onderwijs van het Russisch bestond in anderstalige republieken van de ex-Sovjetunie en in de volksrepublieken. Was dat soms geen wetgevende of politieke beslissing? Ik bezit een kopie van de beslissing van 3 juni 1923 door de Franse minister Leon Bérard om niet alleen het onderwijs van het Esperanto te verbieden maar zelfs de aankondiging van Esperantocursussen of het ter beschikking stellen van schoollokalen. Dat ondermeer Hitler en Stalin het onderwijs van Esperanto verboden en meerdere esperantisten hebben doen executeren, is al voldoende gekend.

Gelieve ook duidelijk te stellen dat de *linguae francae* waarover het gaat nationale talen zijn of waren, en dat ze het resultaat zijn van militaire overwinningen, kolonisatie, dus geweld vanwege imperialistische mogendheden. Deze *linguae francae* zijn helemaal niet zulk "spontaan"

socio-linguïstisch verschijnsel! Overigens is het probleem niet van het Esperanto een officiële EU-taal te maken, maar de EU een realistische, rechtvaardige en democratische oplossing te bezorgen voor het taalprobleem. Hoe dit tot stand te brengen is een taak voor de EU-verantwoordelijken. Een neutraal onderzoek uitgevoerd door neutrale ervaren wetenschappers kan helpen. We mogen niet vergeten dat het probleem onopgelost laten een zeer ernstige, heel gevaarlijke en dure vergissing zou zijn.

En laat ook mij eindigen met een persoonlijk en niet zomaar wetenschappelijk meetbare vaststelling: eenvoudige mensen, die Esperanto leren worden enthousiast over hun ontdekking. Het is het waard zich af te vragen waarom, en deze vaststelling te gebruiken bij de oplossing van het taalprobleem.

### **Het forum van Leonard Orban:**

<http://forums.ec.europa.eu/multilingualism/languages-for-young-people>

Meer info vind je ook in het volgende artikel:  
[www.liberafolio.org/2008/orbanesperanto/](http://www.liberafolio.org/2008/orbanesperanto/)

## **Eksterordinara Membrokunveno de NEJ**

---

Vendredon la 22-an de februaro 2008, la membroj de la nederlanda Esperanto-junularo NEJ kunvenis en dua Eksterordinara Membrokunveno (EM) en Roterdamo. La unua okazis la 29-an de aŭgusto 2007, per kiu oni komencis solvi la inertan situacion en kiu NEJ troviĝis.

Lasta kunveno antaŭ aŭgusto 2007 okazis en 2004. Siatempe la estraro serĉis posteulojn al kiuj ili povos transdoni la estraradon de NEJ. Sed oni ne tuj trovis. Tio ne estas mirinda, ni ja estas malgranda asocio kaj krom tio oni diras ke ĝenerale homoj havas pli kaj pli malmulte da tempo por okupiĝi pri volontulaj laboroj por asocioj.

En 2005 kelkaj membroj de NEJ aktiviĝis kaj preparis sin por eventuala transpreno de la estraraj taskoj. Ĉi tiu transpreno neniam okazis, ĉar somere 2006 kelkaj membroj ekŝiĝis el NEJ post kiam ili ne sukcesis kontentige komuniki kun la estraro. Vi povas legi pri tio en JEN 169.

Kelkaj el la ekŝiĝintaj membroj remembrigis en 2007 kaj, kun aliaj aktivuloj, ili denove okupiĝis pri normala funkciado de NEJ. Tio ne estis tiel facila kiel ŝajnis esti, ĉar denove montriĝis tre malfacile komuniki kun la estraro, precipe kun la kasisto Marcel Geurtsen. Necesis eksterordinara Membrokunveno je 2007.08.29 en kiu la

membroj (ĉeestis 9 homoj, voĉdonis 8 membroj) decidis ke ili volas plejeble baldaŭ havi superrigardon pri la financa stato de NEJ. Por realigi tion oni instalas specialan komisionon (konsistantan el Douwe Beerda, Nico Huurman kaj Ralph Schmeits), kies tasko estis informi la kasiston pri ĉi tiu decido kaj ricevi de li la librotenadon de NEJ por inventari ĝin kaj raporti pri tio al venonta Membrokunveno.

Tiu dua eksterordinara Membrokunveno okazis vendredon la 22-an de februaro 2008. La speciala komisiono raportis ke ili sukcesis informi la kasiston pri la decido de la antaŭa membrokunveno, sed bedaŭrinde oni ricevis nenian kunlaboron de li. Pro tio, kaj pro informoj el kopiaj bankaj konteltiroj de ŝparkonto de NEJ, la prezidanto Robert von dem Borne, decidis unu semajnon antaŭ ĉi tiu membrokunveno suspendi la kasiston.

Post la prezentado de la komisiono pri siaj eltrovoj kaj post la klarigoj de la prezidanto, la membrokunveno decidis taskigi la saman komisionon eltrovi pliajn informojn. La Membrokunveno unuanime aprobis decidon, kiu priskribas la farendajn taskojn depende de la eltrovoj. Ĉeestis 8 membroj kun voĉdonratjo kaj unu transdonita voĉo. Krome estis 2 homoj sen voĉdonrajto.

## **Primitiva Renkontiĝo**

Saluton!

Verŝajne vi jam scias, ke inter la 30-a de aprilo kaj 4-a de majo 2008 okazos la fama Primitiva Renkontiĝo en Den Dolder (Nederlando).

Kaj verŝajne vi jam ankaŭ scias, ke ĉi tiu renkontiĝo elstare taŭgas por renkonti novajn kaj malnovajn amikojn en mojosa etoso.

Sed... vi verŝajne ankoraŭ ne scias, ke vi povas gajni belan premion se vi aliĝas antaŭ la 1-a de aprilo. Do, se ankaŭ vi volas primitivumi kun ni, aliĝu nun! Kaj

eble vi estos unu el la feliĉuloj kiuj gajnas Primitivan Premion:

- dumrenkontiĝa uzo de unu el la luksaj matracoj; aŭ:
- dumekskursa uzo de unu el la bicikloj (alikaze vi mem kunportu/luu biciklon)

La gajnintojn ni informos antaŭ la 14-a de aprilo.

Ĉiujn informojn pri la renkontiĝo kaj aliĝo vi trovas sur <http://dakje.nl>

Ĝis!

*Finjo*

## **Algemene ledenvergadering Vlaamse Esperanto-Jongeren vzw**

Algemene ledenvergadering Vlaamse Esperanto-Jongeren (FLEJA)  
Op zondag 13 april 2008 vindt in het Esperantocentrum in Antwerpen, Frankrijklei 140, om 14u de algemene ledenvergadering plaats. Er zal onder andere een nieuw bestuur worden verkozen. Mocht je interesse hebben om actief te worden in het bestuur van FLEJA, neem dan contact op met een bestuurslid vóór 1 april (contactgegevens zie colofon).

Daarnaast zullen de volgende onderwerpen aan bod komen:

- verslag activiteiten 2007
- financieel verslag 2007
- budget en activiteiten 2008
- het tijdschrift JEN
- vernieuwing webstekken [www.esperanto.be](http://www.esperanto.be) en [www.esperanto.be/jongeren](http://www.esperanto.be/jongeren)

*Heidi Goes, voorzitter*

## Aktuale.info

---

Novajoj pri Esperanto baldaŭ estos haveblaj ne nur en Esperanto. Meze de februaro en Poznano, Pollando, okazis intensa labor-kunsido pri planata multlingva novaĵ-retejo, kiu laŭplane enhavos aktualajn, ĵurnalisme verkitajn novaĵojn kun rilato al Esperanto.

La laborkunsidon partoprenis reprezentantoj de TEJO kaj UEA. Financado venas de la usona fondaĵo ESF, kaj pri kunordigo respondecas la teamo de E@I, kiu realigis ankaŭ la popularegan Esperanto-instruan retejon Lernu.net. Ankaŭ Libera Folio partoprenas la novan projekton, kiu baldaŭ estos ekkonstruata en la adreso Aktuale.info.

Laŭ Peter Baláž, unu el la ĉef-respondeculoj, la planata retejo Aktuale.info estas natura daŭrigo de la sukcesa Lernu.net, kiu de kvin jaroj instruas Esperanton al miloj da interesigantoj en dekoj da lingvoj. Post la sukcesa sperto pri multlingva lern-retejo estas nature krei multlingvan informojn, li diras. Li ne scias klarigi, kial esperantistoj, kiuj ŝatas proponadi Esperanton kiel pontolingvon al internaciaj organizaĵoj, ĝis nun mem ne ekuzis ĝiajn avantaĝojn en komuna informa ret-projekto.

*"Ni esploris dum unu-du jaroj la bezonojn, la eblojn kaj la ekziston de la ĝisnunaj ejoj pri informado pri Esperanto en naciaj lingvoj, kaj*

*22 evidentiĝis, ke estas granda truo*

*en tiu medio. Pro tio ni decidis lanĉi la projekton."*



La usona fondaĵo ESF (Esperantic Studies Foundation) financis la planadon de la nova retejo per iom pli ol 8.000 eŭroj. Per la mono estas financata partatempa dungo de kunordigantoj kaj programistoj, sed ankaŭ la plankunsido ĵus-okazinta en Poznano. Al la kunsido estis invititaj pli ol dek spertuloj pri retprojektoj kaj pri ĵurnalismo.

Krom la kunordigantoj de la projekto, Peter Baláž kaj Jevgenij Gaus, partoprenis interalie kunlaborantoj de la Esperanto-redakcio de Pola Radio kaj reprezentanto de Lernu.net, Sonja Petrović. Kiel reprezentanto de

UEA ĉeestis estrarano Barbara Pietrzak, kaj TEJO estis reprezentita de Felix Zesch, komisiito pri amaskomunikado kaj publikaj rilatoj. Inter la invititoj ĉeestis ankaŭ la redaktoro de Libera Folio, Kalle Kniivilä.

Unu el la ĉefaj inspiroj de la projekto estas la ampleksa kaj altnivela litovlingva retejo Esperanto mozaika, kiu enhavas ne nur bazajn informojn pri Esperanto, sed ankaŭ aktualaĵojn el la Esperanto-movado, fotojn, esperantlingvajn filmetojn kun litovaj tekstoj, esperantan muzikon kaj podkastojn..

Laŭplane, estos diversaj manieroj kontribui al la enhavo de la nova retejo. Uzantoj povos proponi novaĵojn rekte en la retejo aŭ sendi retmesaĝon al speciala adreso, sed laŭ interkonsento eblas ankaŭ aranĝi aŭtomatan kopiadon de novaĵoj el partoprenantaj retejoj, ekzemple per RSS-fluo.

El tiuj diversaj fontoj la redakcia teamo de Aktuale.info kunmetos taŭgan koktelon por la esperantlingva ĉefpaĝo, kaj tradukteamoj faros tradukojn al naciaj lingvoj. La novaĵoj estos legeblaj en diversaj lingvoj rekte en Aktuale.info, sed ili ankaŭ estos facile republikigeblaj en aliaj retejoj. Ĉiuj tekstoj kaj fotoj de Aktuale.info laŭplane estos libere

reuzeblaj, kondiĉe ke la fonto estos indikita. Tiel, se la projekto prosperos, ĝi povos iĝi centra novaĵpereo por informoj pri Esperanto kaj rilataj temoj ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en granda kvanto da naciaj lingvoj.

Laŭ Sonja Petrović la sperto de Lernu.net montras, ke la kunlaborado de diverslingvaj traduk-teamoj per la reto povas funkcii tre glate, eĉ se kulturaj kaj politikaj diferencoj ja foje rimarkeblas.

Grava avantaĝo laŭ ŝi estas ke la projekto havas relativan financan sendependecon de movadaj instancoj, kio ebligas al ĝi raporti en interesa kaj kredinda maniero. Samtempe ŝi emfazas, ke bona kunlaboro unuavice kun UEA kaj TEJO tre gravas por diskonigi la projekton kaj por trovi aktivajn teamanojn.

Antaŭ ol la projekto pluiros la teamo prezentos al Esperantic Studies Foundation sian planon pri la sekvaj paŝoj. Peter Baláž esperas, ke ESF baldaŭ decidus pri la financado de la sekva fazo.

Marte devus komenciĝi la realigfazo de la projekto, kaj ni esperas iun beta-version lanĉi ĝuste antaŭ la UK en Roterdamo.

Legu la tutan artikolon en **[www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org)**

## Activiteitenkalender voorjaar 2008

### MARTO

07/03 ĝis 03/03 | **Vlaardingen (NL)** | Studieweekende  
<http://www.esperanto-nederland.nl/>

19/03 ĝis 25/03 | **Senigallia (IT)** | Internacia Junulara Festivalo  
<http://iej.esperanto.it/ijf/2008/>

21/03 ĝis 28/03 | **Waldfischbach (DE)** | Printempa Semajno  
 Internacia <http://www.esperanto.de/psi>

### APRILIO

04/04 ĝis 06/04 | **Písek (Ĉeĥio)** | Sabla Printempo  
 turisma, kultura kaj faka programo (daŭrigo de la seminario  
 "Esperanto en la reto"). Informojn vi trovos en tiu ĉi JEN.

30/04 ĝis 04/05 | **Den Dolder (NL)** | Primitiva renkontiĝo  
 Elstare taŭga renkontiĝo por renkonti novajn kaj malnovajn amikojn  
 en mojosa etoso. Informojn vi trovos en tiu ĉi JEN.

26-a de aprilo | **Roterdamo** | Malferma tago de UEA  
<http://www.uea.org>

### MAJO

09/05 ĝis 12/05 | **Essen (DE)** |  
 Germana Esperanto-kongreso  
<http://www.esperanto.de/gek>

26/05 ĝis 30/05 | **Vilnius  
 (Litouwen)** | Tutmonda kongreso  
 de esperantistoj-ĵurnalistoj  
<http://www.esperanto.lt>

**EBLAS PARTOPRENI SENPAGE!**



Deze kalender is een selectie! Meer info over bijeenkomsten vind je onder  
 andere in de kalenders van het Hongaarse Eventoj [www.eventoj.hu/](http://www.eventoj.hu/) ,  
 en deze van NEJ [www.esperanto-jongeren.nl/aktiviteiten.php](http://www.esperanto-jongeren.nl/aktiviteiten.php)  
 Neem zeker ook eens een kijkje op [www.mondakalendaro.org](http://www.mondakalendaro.org) !